

# DE HILELISMO AL HOMARANISMO ĉe L. L. ZAMENHOF

De Andreas Künzli

## Parto I

En 1906 L.L. Zamenhof (1859-1917) elpaŝis en esperantujo publike kun ideo, kiu mirigis kaj ekscitis parton de la tiam esperantistaro. Temas pri la diskuto ĉirkaŭ la doktrino de la hilelismo-homaranismo, kiu ne nur dominis la enhavon de la revuo *Ruslanda Esperantisto* (Sankt-Peterburgo), en kiu la hilelisma teksto aperis, sed kiu radiis internacien. La sorto de tiu ideo, sen kiu la esperantismo de Zamenhof ne estus tute komprenebla, estis poste apostrofitita per 'La ideologia dramo de LLZ' (Gaston Waringhien en *Sennacieca Revuo* 81/1953).

La hilelismo-homaranismo fakte formis la kulminon de la idealismaj imagoj de Zamenhof. Ĉi tiu teorio prezentis fortan soci(politik)an-religian akcenton, kaj ĝia kerno estis serĉata en la specifa judeco de Zamenhof kaj en ties ideo solvi la judan problemon, precipe en la Ruslanda Imperio (kie fortiĝis tradicia kontraŭ-judismo kaj eksplodis kontraŭjudaj pogromoj<sup>1</sup>), en la heterogeneco de la etna, religia kaj lingva situacio en Ruslando kaj en la kritiko pri aŭ reago al la tiamaj universalismaj strebadoj diverstipaj (precipe cionismo).

Zamenhof konsideris, ke la etnaj, lingvaj kaj religiaj diferencoj de la homaro estas la ĉefaj kaŭzoj de ĉia malpaco inter la popoloj, kiuj povus esti solvitaj fakte nur per la hilelismo-homaranismo (kaj kompreneble per la lingvo Esperanto). Zamenhof revis, ke la antagonismoj etnaj, lingvaj kaj religiaj malaperos kaj ke ili estos anstataŭitaj de pli altnivelaj 'neŭtralaj' etikaj rilat-principoj kiel solvo por la homaro. Tial li sugestis la 'neŭtrale-homan' lingvon, la 'neŭtrale-homan' religion kaj ankaŭ 'neŭtralan' geografian-politikan terminologion. Ĉe Zamenhof 'neŭtrala' signifis supozeble la sumon de la altaj etikaj valoroj, kiuj estas komunaj al ĉiuj homoj de la tero (kaj ankritaj en la humanismo).

## Hilelismo 1901

Kun sia hilelisma teorio (la ideo ekestis ĉirkaŭ la jaro 1896) Zamenhof elpaŝis publike unuafoje en 1901. Tiam li publikigis sub la pseŭdonimo Homo Sum tekston (aŭ alvokon), kiun li prezentis al kelkaj judoj, inter alie al la cionistoj de Varsovio kaj – inter la esperantistoj – al A.S. Kofman en Odeso, al kiu li mesaĝis en majo 1901 siajn motivojn por la kreo de la hilelismo. En la antaŭparolo al ĉi tiu hilelismo Zamenhof aŭdacis kritiki la politikan cionismon (pri kiu li dubis ke ĝi solvos la judan problemon) kaj komenti la tradicie propagandatajn kaj kredatajn mitojn pri la juda popolo, kiujn li konsideris kiel sofismojn, falsojn kaj memtrompojn. Samtempe li analizis la fazojn de malrapida morto de popolo kaj klarigis kial la judoj ne povas konvertiĝi al kristanismo.<sup>2</sup>

Rigarde al la antaŭvideblaj kritikoj, Zamenhof atentigis en la hilelisma teksto de 1901, ke hilelismo ne signifas novan religion, ĉar ĝi estis formulita jam antaŭ 2000 jaroj de rabeno Hillel.<sup>3</sup> La hilelismo estus do nur „*praktika kaj konkreta efektivigo de tiu religio*“, krome hilelismo ne estus ia sekto, sed ĝi prezentus nur pure teozofian religion, „*kiu jam delonge estas konfesata en animo de ĉiuj inteligentaj reprezentantoj de ĉiuj popoloj kaj eklezioj kaj al kiu la Hilelismo donas nur varman konkretan formon, por ke tiu ĉi religio povu esti vivkapabla*“. Zamenhof estis certa, ke „*al ĉi tiu religio kun pura konscienco povas aliĝi ĉiu morala homo, en*

kiu ajn religio li estus edukita“, kaj „al tiu ĉi religio povas kuraĝe aliĝi ankaŭ tiu, kiu principe neas ĉian religion.“ Fine Zamenhof skribis, ke „Hilelismo estas sendube la sola religio de estonteco, religio, kiu pli aŭ malpli frue elpuŝos kaj per si anstataŭos ĉiujn ekzistantajn, arbitre elspensitajn religiojn. Bazita ne sur iaj arbitre elpensitaj dogmoj kaj fantazioj, ne sur iaj provizore superregemaj doktrinoj aŭ humoroj de homamaso, ne sur homa malklereco, sed sole sur koro kaj racio homa, subordigita ĉie kaj ĉiam al la samaj leĝoj. (...) Tiu ĉi religio egale taŭgos por plej sovaĝa afrikano kaj por plej klera eŭropano. (...)“. Zamenhof klopodis pruvi, ke „Hilelismo estas la plej reala, plej rapida, plej facila kaj samtempe plej altspirita solvo de la juda problemo“. Finfine Zamenhof estis konvinkita, ke „per Hilelismo finiĝos la granda historia misio de la juda popolo“, sed li firme kredis ankaŭ, ke hilelismo povus esti solvo ne nur de la juda problemo, sed ke ĝi estas samtempe „granda fenomeno komunhoma“. Jen la misio de L.L. Zamenhof, kies hilelismo formis la precedencon kaj ponton al Esperanto kaj la esperantismo.

### La lingva demando

En ĉi tiun hilelismon Zamenhof inkludis ankaŭ la lingvan demandon, en kiu li vidis necesa la starigon de „komuna neŭtrala diserva lingvo por ĉiuj hilelistaj temploj“. Do oni vidas, ke neeviteble estas pritraktata en la hilelismo ankaŭ la grava rolo de la lingvo, kiu por Zamenhof estis „la plej sankta propraĵo de homo; en ĝi li pensas, ĝojas kaj malĝojas, kun ĝi estas ligita lia memkonscio, kaj sekve ankaŭ lia individua ekzisto.“ Zamenhof montris sin konvinkita, ke „se ne estus diferenco inter lingvoj, ne estus ankaŭ diversaj popoloj. (...)“ Do laŭ Zamenhof lingvo kaj popolo ne estas apartigeblaj unu de la alia.

Kofman opiniis, ke ne estas bona ideo inkluzivi la lingvan demandon en la hilelismon. Reage al tiu opini-esprimo, Zamenhof respondis al Kofman jene:

„Kara sinjoro! Ne fininte ankoraŭ la legadon de mia broŝuro, vi esprimis al mi vian ĝojon pri tio, ke mi ‘eljetis la demandon de lingvo’; tial mi prezentas al mi kiel malagrabla vi kredeble estis surprizita, kiam vi en la dua parto de la broŝuro tamen trovis tiun demandon! Post multa ŝanceligado mi tamen enprenis la demandon de la lingvo, ĉar mi konvinkiĝis, ke hilelismo sen la lingvo neniel povus ekzisti, ĝi havus neniun sencon kaj prezentus nur falsan, nevivipovan kompromison. Tiel longe kiel la hebreoj ne havos lingvon kaj estos deivgataj en la praktiko ludi la rolon de ‘rusoj’, ‘poloj’, ktp. – ili ĉiam estos malestimataj kaj la hebrea demando neniam estos solvita.“ (O.V., p. 322)

Samletere Zamenhof ekskludis le eblon, ke la hilelismo povus esti danĝera por Esperanto kaj pravigis la reciprokan fruktodonecon de neŭtrala lingvo kaj hilelismo tiel:

„Ne timu tamen, ke la projekto de hilelismo kun lingvo neŭtrala estos danĝera por Esperanto! Ho ne, ho ne! Mi estas certa, ke se vi bone pripensos la aferon, vi venos al la konvinko, ke ambaŭ demandoj estas tre malvaste kaj nedisigeble ligitaj inter si. Tiel same kiel la hilelismo ne povos ekzisti sen lingvo neŭtrala, tiel same la ideo de lingvo neŭtrala neniam povos vere efektiviĝi sen hilelismo!“ (O.V., p. 323)

Samtempe Zamenhof ekklarigis sian kernan konvinkon, kiu projekcias la elformiĝon de t.n. ‘neŭtrala popolo’

„Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la hebrea demando, nek enradikiĝo de lingvo neŭtrala estos iam ebla sen hilelismo, t.e. sen kreo de neŭtrala popolo“.

Ĉi tiuj konvinkoj akompanis kaj okupis Zamenhofon dum ties tuta vivo, alprenante iom post iom universalan karakteron, t.e. liberigante sin de la koncentriĝo je la juda demando kaj alprenante trajtojn de tuteca ideologio kun fokuso al la tuta homaro (de hilelismo al homaranismo).

### **Bulonjo 1905**

En publikaj internaciaj Esperanto-medioj la hilelismaj simptomoj de Zamenhof emfaziĝis dum lia patosa parolado okaze de la inaŭguro de la unua universala kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (Francio) en aŭgusto 1905. Lamentante pri la miljara malamo kaj batalado inter la gentoj kaj sincere ĝojante, ke en Bulonjo „*kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj*“, la humanisto el Varsovio esprimis sian esperon, ke per la lingvo Esperanto la momento por nova komenco de la kuniĝo de la apartigitaj kaj malunuigitaj popoloj alvenis. Dum unuflanke eblis publike diri frazon kiel la ĵus cititan, ankoraŭ tro frue estis la tempo por eldiri kiel „*Kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj; ni ĉiuj de Di' estas filoj*“.<sup>4</sup> Tiu ĉi peco aperis en lia ‘Preĝo sub la verda standardo’, sed la francaj kongres-organizantoj malrekomendis aŭ eĉ malpermesis al li diri ĝin publike. Oni ne forgesu, ke oni vivis en tempo, kie regis ‘malhela’ antisemitismo en Eŭropo (ekzemple la Dreyfus-skandalo en Francio) kaj kie la prireligiaj disputoj en Francio, kiuj ege ekscitis la publikon, ĵus finiĝis per la leĝo pri separo inter eklezio kaj ŝtato.

### **Hilelismo 1906**

Kuraĝigita de la bulonja sukceso, Zamenhof decidis komuniki al la esperantista mondo siajn konvinkojn en la formo de la *Dogmoj de Hilelismo*. Tio okazis anonime kaj kiel supre dirite en la periodaĵo *Ruslanda Esperantisto*, en januaro 1906. La publikigon konsentis akcepti A. Asnes, la redaktoro de la periodaĵo.

Zamenhof difinis la homaranismon kiel esprimon de la strebado al absoluta justeco kaj egaleco inter la popoloj kaj religioj. Li ankaŭ klarigis kio hilelismo NE estas:

„*La Hilelismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malverecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrala-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco*“. (*Ruslanda Esperantisto*, 1/1906, p. 5.)

Elirante de tiu principo, la aŭtoro de la *Dogmoj* formulis la deziratan humanisman-utopian celon kiel finan celon de la hilelismo, kiu kulminas en la elformiĝo de la ‘neŭtrale-homa’ popolo:

„*La Hilelistoj esperas, ke per la konstanta reciproka komunikiĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio-ĉi fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompado*.“ (*Ruslanda Esperantisto*, samloke)<sup>5</sup>

La hilelisma-homaranisma instruo de Zamenhof estis parte miskomprenata. Pro tio la legantoj estis atentigitaj, ke la *Dogmoj de Hilelismo* ne estas la sama afero kiel Esperanto aŭ la esperantismo (kiel ĝi estis difinita en 1905<sup>6</sup>).

La principajn enkondukajn klarigojn sekvis la efektiva *Deklaracio de Hilelismo*, kiu postlasas la impreson de imitita kristana kredokonfeso. Ĝi konsistas el 12 dogmoj kaj el unu aldonaĵo. Laŭ la hilelismo, hilelismo komprenas sin kiel homo en si mem, por kiu ekzistas nur „*idealoj pure homaj*“ (sed ne unuflanke naciaj kaj religiaj) (§1). Hilelismo kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj konsideras, ke ĉiu homo estas taksebla nur laŭ ties persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia (nacia aŭ religia) deveno (§2). La hilelismo kredas, ke „*ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj*“, do la lando devas esti je la dispono al ĉiuj, kiuj vivas en tiu lando, sendepende de nacieco aŭ religia kredo (§3). En tiu kunteksto Zamenhof klopodis distingi la nociojn *popolo, gento, lando, patrujo, regno, lando, nacio, regnanaro, landanaro*, ktp. kaj sugestis, ke ĉiu ŝtata kreaĵo, anstataŭ esti nomata laŭ la nomo de unuopa popolo aŭ nacio, portu ‘neŭtralan’ nomon. Laŭ tiu modelo Ruslando do nomiĝu *Peterburgregno*, Francio nomiĝu *Parizregno*, Polujo nomiĝu *Varsovilando*, ktp. Li montris sin konvinkita, ke tiu solvo signife malpliigus la nacian ŝovinisman. Al Zamenhof tre plaĉis tiel nomataj neŭtralaj landnomoj kiel *Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo, Alĝerio*, kiujn li konsideris kiel modelojn por la nomigo de regnoj aŭ ŝtatoj. (§5). Koncerne la uzadon de lingvoj Zamenhof rekomendis, ke private en familio ĉiu homo parolu kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesu kian religion li volas, „*sed en komunikiĝado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj vivi laŭ la principoj de religio neŭtrale-homa*“. Ĉiun provon altrudi unu lingvon al aliaj homoj Zamenhof rigardis „*kiel barbarecon*“. (§4). Zamenhof ja agnoskis la diversecon kaj la ekzistorajton de la gentoj kaj nacioj, sed aliflanke li komprenis la mondan loĝantaron kiel tutecon kvazaŭ sennaciecan (§8, 9).

La hilelismo mem enhavas ankaŭ tre konkretan religian aŭ teozofian akcenton. Nome kiel plej altan ŝtupon de la homa kunvivado la hilelismo agnoskas forton de pli alta grado, nome Dion. Sub la nomo ‘Dio’ la hilelismo „*komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro*“. (§10). Por la praktikado de la hilelistaj metodoj Zamenhof antaŭvidis specialajn tempojn, kiuj devus ekzisti en ĉiu urbo, kaj en kiuj la la moroj kaj festoj neŭtrale-homaj devas esti ellaborataj (§11).

Kompreneble Zamenhof konsciis pri la problemeco de sia hilelismo. Por eviti miskomprenojn, en la februara numero de *Ruslanda Esperantisto* li publikigis gravan Aldonon al la Dogmoj de Hilelismo. En ĝi Zamenhof komunikis, ke la „*publikigitaj ‘Dogmoj’ havas signifan nur principan*“, do provizoran. Ilia definitiva redaktado estos fiksita nur poste. Kaj samloke Zamenhof sugestis, ke la hilelismo prefere portu la titolon homaranismo, kiu pli precize esprimas la tutan esencon de la ideo. Krome li skribis, ke la rondetoj hilelistaj havus „*karakteron ne religian, sed pure societatan kaj servas por liberaj amikaj interparoladoj pri ĉiuj eblaj temoj (...)*“.

En la marta numero de *Ruslanda Esperantisto* la redaktoro A. Asnes raportis, ke la ideo de la hilelismo trovis grandan intereson ĉe la esperantistoj kaj ke multaj Esperanto-adeptoj proklamis sian aliĝon al la teorio. En Varsovio estis eĉ fondita hilelista grupo. Ankaŭ el eksterlando anoncis sin kelkaj simpatiantoj. Kiel Zamenhof cetere konfirmis, la neŭtrala lingvo Esperanto estis agnoskita ankaŭ de la hilelistoj, la adeptoj de la hilelismo.

En ĉi tiu kadro ne estas nia tasko fari detalegan analizon de la enhavo kaj eventuala signifo de la hilelismo-homaranismo aŭ pritaksi ĝin el filozofia-teologia vidpunkto. Apud la demando pri ĝia efektivigeblo aperas maksimume la ideo kompari ĝin kun aliaj religi-filozofiaj tendencoj. Oni povus mencii ekzemple la ‘Homaran Religion’ de la pozitivistoj Auguste Comte (1798-1857), la religian instruon de Baha’ullah (1817-1892) kaj la ideojn de la framasonismo. Sed estas dubinde, ĉu Zamenhof staris sub la rekta influo de tiuj teorioj, kvankam li montris

simpation al bahaismo kaj framasonismo. Multe pli li baziĝis je la historiaj spertoj de la juda (hebrea) popolo, al kiu li mem apartenis, kaj ĉerpis el sia iama aktiveco por la cionismo, kiun li forlasis favore al la evoluado de propra savinstruo por la tuta homaro.<sup>7</sup>

Dume eblas konkludi jene: La alternativa, avangarda kaj emancipiĝema, fakte revolucia karaktero de la dogmoj de hilelismo estas nepretervidebla. Senkonsidere al la naivaj aŭ utopiaj elementoj, kiuj karakterizas la dogmojn de hilelismo, la aŭtoro de tiu doktrino devas esti konsiderata kiel grava kaj kuraĝa pioniro en la historio de la spirithistoriaj kaj idealismaj ideoj kaj sur la kampo de la emancipismaj kaj homar-unuigaj strebadoj, kiu faris gravan kontribuon al la modernaj homaj rajtoj kaj al la neŭtralisma penso. Se aldone oni ankoraŭ adekvate pritaksas la lingvon Esperanto kiel genian kreaĵon de unusola homo, de modesta, malriĉa kaj mistikema judo el orienta Eŭropo, necesas esprimi la senton de profunda estimo antaŭ L.L. Zamenhof pro ties supereco. Oni povas nur bedaŭri, ke liaj ideoj estas ĝis nun ne sufiĉe respektataj aŭ eĉ ignorataj de granda parto de la homaro.

(daŭrigote. En la venonta fojo estos priskribitaj la reagoj al hilelismo-homaranismo de diversaj flankoj kaj kiel Zamenhof reagis al tiuj kritikoj).

#### ***Piednotoj:***

<sup>1</sup> La kontraŭ-judismo respektive antisemitismo, sed ankaŭ rasismo kaj panslavismo en Ruslando havas longan tradicion kaj konas tre subtilajn formojn aŭ nuancojn. Periodoj de toleremo kaj de pli malpli forta diskriminacio al judoj alternis unu la alian, depende de la reĝimo de diversaj caroj kaj depende de la aktuala sociekonomia situacio. En Ruslando oni kredis, ke la 'malhela' juda forto intrigas kaj konspiras kontraŭ la Cara Imperio. Kiam fine de la 18a jarcento la teritorio de Pollando-Litovio estis dividita inter Ruslando (oriento), Prusujo (okcidento) kaj Aŭstro-Hungarujo (sudo), la Ruslanda Imperio heredis la judan popolon (preskaŭ miliono da homoj), kiu subite loĝis ĉe la okcidenta periferio de Ruslando. En 1804, sub caro Aleksandro I. (1801-25), estis starigita speciala loĝ-zonego por la judoj, kiu etendiĝis de Kurlando trans la teritorioj litova, pola, blankrusa, ukraina ĝis Krimeo, kaj kiun la judoj ne rajtis forlasi (ĉi tiu loĝ-zono estis likvidita nur en 1917). La publikigo de la lingvo Esperanto koincidis kun la reĝimo de la iom 'liberala' caro Aleksandro II. (1855-81). Kiam Aleksandro II. estis murdita en 1881 en Sankt-Peterburgo, oni trovis inter la revoluciuloj ankaŭ judinon. Sub la nova 'reakcia' caro Aleksandro III. (1881-94) kaj precipe sub ties ege kontraŭjudaj politikistoj Pobedonoscev, Ignat'ev kaj aliaj, judoj estis konsiderataj kiel detruantoj de la 'natura ordo' kaj sekve ili devis elteni pli kaj pli grandan diskriminacion. Ĉi tiu ĝenerala malamo kulminis post 1881 en la eksplodo de pogromoj kontraŭ ili en multaj urboj de la Ruslanda Imperio, precipe en la speciala loĝ-zono, sed ankaŭ en Moskvo kaj aliloke. Ĉi tiuj pogromoj ripetigis en la jaroj 1903-06 (PIV difinas la rusan vorton pogromo kiel „amasbuĉadon kaj elrabadon de judoj, registare instigita aŭ aprobita“). Verŝajne tiuj pogromoj fontis en iu psikologie klarigebla historio de nejudoj kontraŭ judoj, ĉar nejudoj kredis, ke ili estas iel-tiel minacataj de judoj aŭ troviĝas en (ekonomia kaj socia) malavantaĝo kompare kun ili. Efektive multaj judoj aŭ havis bonajn postenojn en la ŝtata administracio aŭ kiel sendependaj entreprenistoj, plenumante ĉu intelektan profesion en urboj aŭ laborante ekzemple kiel estroj de restoracioj en la kamparo, kie ili rajtis vendi brandon. En la psiko de multaj kristanoj rolis, krom la tradiciaj kontraŭjudaj argumentoj sur religia bazo kaj la sento de religia superstiĉo (kiel la kredo, ke judoj faris ritualajn murdojn al kristanoj, ktp.), evidente ankaŭ ĵaluzo al judoj kaj frustracio pri la propra malfavora situacio. Apud la akriĝanta ekonomia konkurenco novaj fenomenoj en la 19a jarcento estis la kreskanta etna-politika naciismo sur ĉiuj flankoj (rusa, pola, ukraina, ktp.) kaj la socia emancipiĝo de la judoj mem, kiuj pli kaj pli konsciis pri sia malfacila sorto, sed ankaŭ pri sia valoro kiel komercistoj kaj intelektuloj (pri tio la ruslandaj politikistoj estis bone konsciaj). Ideologie influata flanke de la kontraŭjuda gazetaro (kiu estis parte apogata de ŝtataj aŭtoritatoj), en la plebo aŭ popolaĉo troviĝis iuj, kiuj sentis sin provokataj fiagadi konkrete per pogromoj kontraŭ la judoj. La ruslandaj aŭtoritatoj, eĉ ankoraŭ sub la lasta caro Nikolao II. (1894-1917), kiu estis konsiderata kiel tre febla, ofte toleris tiujn krimagadojn, des pli se ili estis efektividitaj de anonimaj sovaĝuloj parte ebriaj. La loka polico tamen klopodis haltigi la ekscesojn, kiuj eksplodis en centoj da urboj kaj vilaĝoj kaj kiuj

kaŭzis konsiderindan damaĝon materian kun multaj vunditoj aŭ eĉ mortintoj. (Pri la pogromoj en Pollando kaj Ruslando Zamenhof raportis en siaj ruslingvaj artikoloj por la gazeto *Razsvet*, en siaj famaj leteroj al Borovko kaj Michaux kaj en sia kongresa alparolado en Ĝenevo en 1906). Do sub tiu neeltenebla premo centmiloj da timigitaj judoj elmigris en tiu epoko el Ruslando ĉefe al Usono kaj Palestino, kio estis la sola alternativo al la restado kaj asimilado en maltrankvila Ruslando, kies aŭtoritatoj ne povis garantii la protekton de la judoj. (Indas legi la dek- /respektive tri-/ voluman *Mondan Historion de la juda popolo* de Dubnov, en kiu la situacio de la judoj kaj la pogromoj en tiama Ruslando estas tre detale kaj impresive priskribita.)

<sup>2</sup> Opiniante, ke la judoj estas inter si ligitaj nur per religio (kaj ke ĝi ne estas nacio en etna senco kiel cionismo asertis), kaj ke la nocioj 'juda popolo' kaj 'juda patriotismo' estus bazitaj sur miskompreno kaj sur konfuziĝo de nocioj, Zamenhof resumis la tragediecon de la judoj per jenaj vortoj: „Kio do ni estas? Estante disigitaj grupoj, ligitaj inter si nur per komuneco de religio, en nacia rilato jam delonge ni ne faras unuecan judan popolon. Kristaniĝi laŭ naturaj niaj lingvoj kaj laŭ loĝlokoj en novaj apartaj popoloj ni havas neniam ŝancojn, kaj enverŝiĝi en ĉirkauantajn popolojn, pro nacie-ekskluziva spirito de nia religio, ni ne havas eblecon. Do, en nacia rilato ni estas kondamnitaj al eterna pendado inter ĉielo kaj tero, kaj en tio ĉi konsistas la tuta tragedieco de nia stato.“ Tial Zamenhof opiniis, ke „panjudista nacieco, kaj sekve cionismo, elvokita de ĝi, kiel *natura* idealo ĉe ni ne ekzistas kaj ne devas ekzisti.“ Cionismon li konsideris „bona el utilisma vidpunkto, t.e. ĝi povas esti bona kiel maniero por ĉesigi la suferojn de niaj fratoj.“ Kiel solvon de la juda demando Zamenhof sugestis al la judoj la „ĉesigon de la ekzistado de la hebrea religio, t.e. ne de ĝia spirito, sed nur de ĝia ekstera formo.“ Zamenhof observis, ke la ekstera hebrea religio enhavas absolute nenion aparte idealan, ke ĝi ne staras pli alte ol la aliaj nunaj religioj kaj ke ĝi estas eĉ iom kaduka, ĉar ĝi neniam esprimas la religiajn konvinkojn de la judoj, kiuj vidas en tiu religio nur malplenan sonon kaj ofte eĉ hontas pri ĝi. Laŭ li la hebrea religio estis fantomo sen signifo. Ĉar la judoj ne volas deklari sin senkonfesia kaj ankaŭ neniel povas alpreni kristanismon, ili estas devigataj krei novan religion, absolute puran kaj alireblan al ĉiu. Cetere per la frazo „Judoj ne estas kreitaj el alia karno kaj sango, ol aliaj popoloj“, Zamenhof esprimis esencan pridubon de la ekskluziveco de la judoj.

<sup>3</sup> Temas pri Hillel la Babilonano, kiu naskiĝis verŝajne -80 aŭ -70 a.Kr., kiu alvenis de Babilonio en ĉ. -60 aŭ -50 kaj mortis en +10. Laŭ tiuj datoj lia vivo koincidis do kun la regado de Herodo la Granda kaj kompreneble kun tiu de Jesuo el Nazareto. Pri la biografio de Hillel mem ne estas multe konata. Hillel diris: Agu kun aliaj tiel, kiel vi volus, ke aliaj agu kun vi, kaj faru nek videble, nek kaŝite tiajn agojn, pri kiuj via interna voĉo diras al vi, ke ili ne plaĉas al Dio.

<sup>4</sup> En tiu frazo oni kredas malkovri la influon flanke de la ekumenisma ideo.

<sup>5</sup> Interesa estas jena paralelo: En la 19a jarcento la caroj de Ruslando imagis al si la solvon de la La 'juda problemo' per la proklamita politiko de la integriĝo (aŭ asimiliĝo) de la judoj en la ruslanda (respektive ruslingva) civilizo, kun la espero, ke la juda demando solviĝos per si mem, t.e. ke la judoj *kunfandiĝos* kun la kristanoj en Ruslando kaj per tio finfine malperos el la historio.

<sup>6</sup> vd. Privat, E.: Historio de la lingvo Esperanto, ĉapitro pri la Bulonja Deklaracio.

<sup>7</sup> Al la pogromoj kaj ĝenerale al la kontraŭ-judisma sinteno en la 19a jarcento en Ruslando aperis inter judaj aktivuloj diversaj politikaj-filozofiaj reagoj rilate la solvon de la juda demando.

Ekzemple la politiko de la *integriĝo, asimilado*: Parto de la judoj, precipe la urba intelektularo, celis integriĝon, enradikiĝon, asimiladon al la ilin ĉirkaŭantaj ŝtataj kaj sociaj kondiĉoj. En kelkaj kazoj tio ankaŭ signifis kristanan baptiĝon. La familio Zamenhof, kiu vivis en la Ruslanda Imperio, apartenis al tiu kategorio: la patro Mordeĥaj-Marko, naskita en 1837, estis instruisto-cenzuristo, la filo Lejzer-Ludoviko trapasis la kutiman profesian kleriĝon kaj mem povis studi medicinon en Moskvo (1879-81), ktp. En la familio Zamenhof oni uzadis la rusan lingvon, Lejzer (Eliezer) Zamenhof elektis laŭ tiama kutimo ankaŭ la kristanan nomon Ludwik. La integriĝo kaj lojaleco estis rekompencitaj de la ŝtato per garantio de profesia kariero ekzemple en ŝtataj instancoj (precipe en la tempo de Aleksandro II.). La konsekvenco estis, ke unuflanke judoj estis alligitaj al la ŝtata sistemo kaj submetitaj al la rusiga politiko, ĝuante portempe diversajn sociajn avantaĝojn.

La politiko de klerigo kaj raciigo, la *Haskalao*, kiu furoris inter 1770 kaj 1880, estis la specifa juda movado el la epoko de la raci(onal)ismo, celante la kleriĝon de la judoj surbaze de Talmudo kaj la hebrea (ne la jida) lingvo. La patro de la Haskalao nomiĝis Moses Mendelssohn (1726-1789), signifaj verkistoj de Haskalao estis Ŝolem Aleĥem (1859-1916) kaj Izĥok Lejb Perc (1851-1915), en Ruslando Mordeĥai Aaron Guenzburg (1795-1846). La ortodoksaj judoj luktis kontraŭ la Haskalao. En okcidenta Eŭropo Haskalao finiĝis per la asimiliĝo de la judoj, en Rusio kontraŭ-judismo kaj antisemitismo ĝin ĉesigis.

Evidente la patro de L.L. Zamenjof estis influita de la Haskalao, celante la integriĝon en la kulturo en kiu oni vivas.

Emancipiĝo / ekesto de judaj movadoj liberigaj: *Sionismo/cionismo/elmigrado*: Temas pri (la plej konata) juda nacia movado, kiu ekestis en la dua duono de la 19a jarcento sekve al la fortiĝo de la simptomoj de naciismo kaj kontraŭ-judismo/antisemitismo (en la formo de pogromoj precipe ekde 1881). La celo de la cionismo estis starigi propran judan ŝtaton (Ciono) kaj reheimigi la judojn en ties historian hejmlandon. La nocio estis kreita de Nathan Birnbaum en 1890. La cionismo ekestis inter la judoj de la eŭropa diasporo. Ĝiaj radikoj estas troveblaj en la Biblio (Genezo 12,3, komenco de la popolo Izraelo). Post kiam la unuaj ruslandaj judoj migris ekde 1882 al Palestino, la cionisto Theodor Herzl (1860-1904) publikigis sian faman libron *La Juda Ŝtato* (1896) kaj faris tiun movadon internacie atentata kaj rekonata. Antaŭ la okupiĝo pri Esperanto ankaŭ L.L. Zamenhof partoprenis la diskuton pri cionismo, fondante en Varsovio la unuan cirkolon de la movado Ĥibat-Cion, kaj laboris por la reformo de la jida lingvo. L.L. Zamenhof esprimiĝis ne nur kontraŭ la asimilado de la judaro en Ruslando kaj, kritikante la politikon de la cionismo, kiu pledis por la elmigrado de la judoj al Palestino, Zamenhof favoris kiel solvon de la juda demando la elmigradon de la judoj al 'neŭtrala' teritorio, kiu ankoraŭ apartenas al neniu. Tia teritorio laŭ li ekzistis rande de Usono, en maldense loĝata zono, kie la rifuĝintoj povus trankvile koncentriĝi kaj kie ili fariĝus *mondcivilantoj*. Kiel konate Zamenhof por si mem ne realigis la opcion de elmigrado. Palestinon li konsideris netaŭga kiel novan hejmlandon por la judoj, ĉar ĝi ŝajnis al li tro primitiva lando. Due ĝi tiam apartenis al Turkujo kaj estis dominata de „sangavidaj fanatikuloj“, kaj nelaste li estis konvinkita, ke pro tio ke kristanoj kaj mahometanoj ĝin same pretendas, aperos novaj konfliktoj kun la judoj. Kompreneble Zamenhof, kiu mortis en 1917, ne povis antaŭvidi la politikan evoluon, ke la Osmana Imperio disfalis kun la unua mondmilito, ke angloj poste administros Palestinon kaj ke en 1948, post la senekzempla holokaŭsto en Eŭropo, estos fondita la ŝtato Israelo.

La aŭtoro de la '*aŭto-emancipiĝo*', Leon Pinsker (1821-1891), konsideris la ĝisnunan vojon de la juda emancipiĝo kiel fiaskitan kaj postulis la emancipiĝon de la judoj en formo de propra nacio, kiu laŭ li povus efektiviĝi nur ekster la eŭropa kontinento (eble en Sudameriko aŭ en Palestino). Estas interese konstati, ke la granda ondo de judaj elmigrintoj (ĉ. 2 milionoj) elmigris ekde 1881 el Ruslando al Nordameriko.

Por la teorio de la *aŭtonomismo* (Simon Dubnov, 1860-1941) kiel bazo por la nacia vivo de popolo servis la spirita kaj kultura aŭtonomio: „En ĉiu ŝtato, la popolkomunumo devus unuiĝi, laŭ programo de aŭtonomismo, al centra organo de memregado, kaj tiuj unuiĝoj devus siaflanke konsistigi monduunuiĝon, kiu organizus en ĉiuj lokoj nacian kongreson kaj reprezentus la tutan judaron.“ Ĉar la problemoj de la judoj estis, ke ili ne posedas propran teritorion, Dubnov celis la agnoskon de la judoj kiel oficialan nacian malplimulton kun efektiva protekto en la koncerna lando kie ili vivas. Krome li kredis, ke la judoj reprezentas pli altan ŝtupon de la naciismo, ĉar kiel plej maljuna nacio de la mondo ili jam venkis la fruan ŝtupon de la teritoria naciismo, konservante sian naciecon dum jarcentoj en la diasporo (koncerne la „pli altan ŝtupon“ malkovrebilas tre simila pozicio de la judoj respektive la hilelistoj en la zamenhafa hilelismo). Post la unua mondmilito, ekzemple en la nova ŝtato Pollando kaj en la baltaj landoj, la judoj efektive ricevis la oficialan statuson kiel nacia malplimulto.

Aliaj tendencoj: La *bundistoj* postulis la agnoskon de la jida lingvo por la judoj, same kiel la poloj parolas pole aŭ la ukrainoj ukraine. Ĉi tiun postulon la *socialista* movado rifuzis. La *universalismo* kredis en la solvon de la problemoj kun universala karaktero, la *mesiismo* propagandis la surteran Reĝolandon de Dio kaj la socialan progreson. La *patriotismo* postulis la lojalecon al sia patrujo (por komparo: „Hilelisto estas tute ne kosmopolita, ĉar hilelisto restas fidela al sia patrujo, kondiĉe ke en tiu patrujo, ĉiuj samnacioj havu la samajn rajtojn,“ ktp.). Kontraŭe al *naciismo*, kiu tre furoris en la vivotempo de Zamenhof, la *kosmopolitismo* baziĝis je la kredo, ke la homoj estas la civitanoj de la tero, devas konsideri (ami) sin reciproke kiel fratoj kaj havas la rajton vivi ĉie (ankaŭ ĉe Zamenhof aperis tiaj vizioj).

La *liberalismo* predikis la emancipiĝon de ĉiaj tradiciaj dogmoj el la feŭdalismo, absolutismo kaj totalismo, kies celoj estas pravigi la malliberecon de la homoj. En la centro de la liberalisma koncepto staras la individuo, kiu devas havi la kiel eble plej vastan personan liberecon kaj respondecon.

Estas interese, ke paralelojn al tiuj diversaj tendencoj kaj filozofiaj konceptoj oni kredas trovi aŭ trovas en la hilelismo-homaranismo aŭ en la ĝenerala pensado de Zamenhof.

Sen hezito oni povas enkadrigi la hilelism-homaranismon de Zamenhof inter la menciitaj filozofiaj-politikaj tendencoj de la 19a kaj frua 20a jarcento. Kvankam la hilelismo-homaranismo de Zamenhof en la realeco apenaŭ trovis adeptojn, tiu teorio postlasis spurojn en la esperantismo (sed ne eksplicite aŭ senpere en ĝia oficiala difino de 1905), kiu estis adoptita kaj estas praktikata de multegaj homoj en plej diversaj landoj de la mondo.

## Parto II

Fakte L.L. Zamenhof origine intencis prezenti la hilelismon ne antaŭ la 2a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo en 1906. En *Ruslanda Esperantisto* 1/1906 li skribis: „*La mirinda sukceso de la Bulonja kongreso konvinkis la iniciatorojn de la hilelismo, ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter la popoloj en la praktiko estas plene ebla. Tial ili decidis uzi la plej proksiman tutmondan kongreson de la esperantistoj en Ĝenevo en Septembro 1906, por proponi al ĉiuj amikoj de interpopola justeco, unuiĝi en apartan grupon, kiu inter la amikoj de internacia lingvo prezentus apartan sekcion.*“

### Hilelismo – homaranismo en 1906

Rigarde al la komplika politika kaj socia situacio en la Ruslanda Imperio, de kie Zamenhof devenis, li decidis elpaŝi kun la projekto multe pli frue ol origine intencite. Li pravigis tiun intencon tiel: „*En la nuna kriza momento, kiam nia patrujo bezonas ĉiujn siajn fortojn, estas necese enkonduki en la vivon tiajn dogmojn, kiuj permesus al ĉiuj diversgentaj kaj diversreligiaj regnantoj ĉesigi siajn reciprokajn malpacon kaj kalkulojn kaj sincere unuiĝi por la savo de nia komuna patrujo, kiu devas kompreneble fariĝi fine proprajo de ĉiuj siaj regnantoj kaj ne sole de unu gento aŭ religio.*“ Samtempe li forte dubis, ĉu la homoj en Ruslando estas maturaj por akcepti tian ideon: „*Kvankam la grandega plimulto de niaj samregnantoj estas ankoraŭ tute ne preparita por nia ideo kaj nia voĉo longan tempon ankoraŭ restos voĉo krianta en dezerto, estas tamen grave, ke niaj principoj estu konataj al niaj samregnantoj, por ke tiuj malmultaj, kiuj serĉas intergentan justecon, sciu, en kio ĝi laŭ nia opinio konsistas. Jen estas la kaŭzo, kial la hilelistoj decidis publikigi siajn dogmojn jam nun kaj proponi al ĉiuj amikoj de intergenta egaleco kaj frateco, kiel ajn malgrandnombraj ili estas, aliĝi al ili.*“<sup>1</sup>

Ĉar Zamenhof anticipe kalkulis pri rezisto kontraŭ sia hilelismo el esperantistaj medioj, en piednoto al sia kontribuaĵo en *Ruslanda Esperantisto* 1/1906 li rimarkigis: „*Oni ne devas intermiksi la hilelismon kun la esperantismo ! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperantisto kaj tamen kontraŭulo de la hilelismo.*“

### Aproboj kaj unua rondo hilelista-homarana

En la marta numero de *Ruslanda Esperantisto* redaktoro A. Asnes raportis, ke la ideo de la hilelismo trovis grandan intereson ĉe la esperantistoj kaj ke multaj Esperanto-adeptoj proklamis sian aliĝon al la teorio.<sup>2</sup> Inter la malmultaj publikaj admirantoj de la idealismo de L. L. Zamenhof troviĝis, krom Asnes, la redaktoro mem de *Ruslanda Esperantisto*, ankaŭ la fama verkisto Lev Nikoaleviĉ Tolstoj (1828-1910) kaj la renoma lingvisto Jan Baudouin de Courtenay (1845-1929). Ambaŭ personecoj detale kaj tre pozitive esprimis sin pri la esperanta afero, inkluzive de ĝia humanisma ideo en si mem.<sup>3</sup> Kiel adreson de la sekretario de la „Unua rondeto hilelista“ Zamenhof indikis la adreson de sia frato d-ro Aleksander Zamenhof en Varsovio, str. Nowolipki No 43 (tiu adreso estis provizora, ĉar Zamenhof anoncis, ke baldaŭ estos alia sekretario). En la kvara numero de 1906 de *Ruslanda Esperantisto* oni povis legi raporton pri la agadoj de la „Unua Grupo Homarana“, kies nova sekretario estis d-ro A. Waldenberg en Varsovio.

Iom poste en 1906 Zamenhof aperigis „plibonigitan kaj plikompletigitan eldonon de dogmoj de hilelismo“ en formo de aparta broŝuro (en la rusa lingvo kaj en esperanto en eldono de po 700 ekzempleroj) kaj sub la titolo „homaranismo“. Sed la eldiroj de la dogmoj esence



restis la samaj, la teksto estis pli malpli identa, ĝi fariĝis iom pli longa pro la aldono de diversaj pli detalaj klarigoj; simple la nocio hilelistoj malaperis kaj estis anstataŭita de la nocio homarano. Zamenhof klarigis, ke „*la ideo de homaranismo naskiĝis de la antaŭe ekzistinta ideo de 'hilelismo', de kiu ĝi distingiĝas nur per tio, ke la hilelismo koncernis nur unu homan grupon, dum la homaranismo koncernas ĉiujn popolojn kaj religiojn*“. La homaranismon mem li difinis kiel „*celadon al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco*“.

### **La kritiko de Dombrovskij**

Sed aliflanke la hilelismo kaŭzis akran kritikon flanke de kelkaj signifaj eŭropaj esperantistoj. Inter la unuaj reagantoj al la dogmoj de hilelismo troviĝis A.A. Dambrauskas (Dombrovskij, 1860-1938), katolika pastro en Kaŭno (Litovio, Ruslanda Imperio).

Jen kelkaj ĉefaj citoj el la komento de Dombrovskij, kiu estis publikigita en *Ruslanda Esperantisto* 3/1906:

„La hilelismo, al kiu *Ruslanda Esperantisto* oferis tiom da loko en sia januara numero, meritas ĝin, sed ne en tia grado, kiel eble pri ĝi pensas ĝiaj iniciatoroj.

En la hilelismo oni devas diferencii du flankojn: *pozitivan kaj negativan*.

Pozitiva valoro de hilelismo konsistas en tio, ke ĝi igas ĉiun homon pensantan difini pli precize siajn rilatojn: *al si mem, al Dio, kaj al siaj proksimuloj*. (...) La hilelismo volas montri, ke (...) iom da filozofio en la vivo estas absoluta necesaĵo. Kaj en tio ĉi la hilelismo estas prava. Ni diros plu: ĝi povas esti ankoraŭ utila al homoj havintaj antaŭe neniamajn principojn religiajn aŭ filozofiajn. En tio ĉi konsistas la pozitiva flanko de hilelismo.

Sed (...) en hilelismo ekzistas ankoraŭ alia flanko – negativa. Per ĝi la hilelismo volante esti sistemo supernacia kaj superreligia, fariĝas bedaŭrinde kontraŭnacia kaj kontraŭreligia. (...) Malgrau belaj vortoj kaj bonaj intencoj de iniciatoroj, la direktaj ‘dogmoj’ devos ĉiun konsekvencajn hileliston pere aŭ senpere igadi al la malŝato de sia patra lingvo, de sia nacio, de sia lando kaj de sia religio, ĉar la hilelismo havas ja nur *unu celon* – el ĉiuj homoj kaj nacioj fari unu grandan ‘neŭtrale homan’ formikejon, en kiu ekzistus nenia diferenco – nacia, politika, religia, filozofia ktp.

Laŭ nia opinio la fina celo de hilelismo, nome la unueco kaj unuiĝo de ĉiuj nacioj estas idealo bela, sed *tre malnova*. La unua homo, kiu ĝin klare esprimis estis efektive ‘*palestina saĝulo*’, *tamen ne Hilel'o, sed Jesuo Kristo*. [Dombrovskij referencis al la Johana Evangelio, XVII,21, kie li trovis la principon de la universala unueco].

La iniciatoroj de hilelismo opinias, ke la kaŭzoj precipaj de nuntempa societa malbono en la tuta mondo estas la diverseco de lingvoj kaj religioj. Granda eraro. La multlingveco kaj diversreligieco estas ne *kaŭzoj*, sed nur *pretekstoj* de militoj kaj persekutadoj. La homoj kaj nacioj persekutas kaj militas ne por tio, ke ili estus *troaj patriotoj aŭ troaj religiuloj*, sed kontraŭe, ke ili estas *nesufiĉe patriotaj* kaj malmulte *religiaj*, aŭ pli simple pro tio, ke ili estas *tro malbonaj*. Ili scias bonon, sed ĝin ne faras, ili scias malbonon kaj ĝin faras. Por fari do homojn pli bonaj, por inspiri al ili pli da *bona volo kaj pli da morala forto* la hilelismo, laŭ mia opinio, ne taŭgas.

Cetere, pri la abomenindeco de persekutoj kaj militoj kaj pri la neceso de unueco multe kaj bele predikadis kaj predikadas la anoj de humanismo, de kosmopolitismo, de framasonismo k.a.

Tiel ni tute ne komprenas, kia estis bezono malkvietigi la bonan babilonan rabenon Hilel'on por bapti per lia nomo la novan sistemon, des pli, ke la dirita 'palestina saĝulo' (...) apenaŭ konsentus la 'dogmojn' de hilelismo rekoni kiel siajn.“

Al Asnes Zamenhof skribis la 25an de januaro 1906: „*La kritiko de prof. Dombrovski sendube estas tre mallaŭda (ĉar li ja estas pastro kaj sekve ne povas aprobi hilelismen)*“. En la sama letero Zamenhof montris sin tute malferma al kritiko: „*Tamen mi konsilas al vi akcepti lian kritikon por via ĵurnalo; kaj ne sole lian, sed ankaŭ diversajn aliajn kritikojn, kiujn vi eble ricevus, ĉar estas necese, ke la afero estu senpartie kaj ĉiuflanke analizita kaj prijuĝita. En okazo de bezono mi poste (sub la pseŭdonimo) skribos kontraŭkритikon.*“ Ankaŭ en posta letero al Asnes Zamenhof konfirmis, ke li estus „*eĉ tre kontenta, se via gazeto malfermus vastan polemikon pri la hilelismo-homaranismo, ĉar nur per senpartia polemiko ni ekscios la efektivan veron, kio estas por mi la plej grava*“.<sup>4</sup>

### Repliko al Dombrovskij

Sian anoncitan replikon al la kurta, sed akra kritiko de Dombrovskij 'Homarano' do aperigis en *Ruslanda Esperantisto* 5/1906. En tiu artikolo la aŭtoro enkonduke rimarkigis, ke la kritiko de Dombrovskij mirigis lin kaj ke li atentigas, ke „*la tuta artikolo estis kaŭzita de simpla malkompreniĝo*“.

Konsciante, ke la temo estas „*tiel ampleksa*“, Homarano provis forviŝi kelkajn malklarecojn, kaŭzitaĵojn de preseraro en la rusa teksto. Krome Homarano avertis, ke li ne intencis meti „*Hilelon pli alte ol Jesuon Kriston*“: „*La homaranoj ne havas eĉ la plej malgrandan intencon komparadi reciproke la valoron de diversaj religioj kaj de iliaj fondintoj; la ideo detronigi Jesuon Kriston por la kristanoj aŭ Mozeon por la hebreoj aŭ Mahometon por la mahometanoj ktp. kaj surtroniĝi anstataŭ ili Hillelon neniam eĉ por unu minuto venis en la kapon de iu homarano.*“ La hilelismo ne estis kreita por „*honoru pli Hillelon ol Kriston aŭ Mozeon, sed nur tial, ke la principo, kiu donis al la homaranoj la eblon krei ponton inter ĉiuj religioj (...)*“. Krom tio la hilelistoj „*ne havas eĉ la plej malgrandan intencon krei ian novan religion. (...)*“ En letero al Javal, 17.05.1906, Zamenhof konfirmis, ke la „*homaranismo ne estas nova religio, ĝi estas nur neŭtrala ponto (...)*“.

La riproĉon de Dombrovskij, ke la ideoj de la hilelismo estas nenio nova, Homarano replikis, ke „*en la daŭro de tre multaj jaroj la iniciatoroj devis malfacile bataladi kun si mem, konstante serĉadi, esploradi kaj ŝanĝadi*“ por inventi tiujn dogmojn, kiuj estis kreitaj por difini la „*absolutan justecon kaj logikon*“. La diferencoj de la antaŭaj religiuloj kaj la hilelistoj estus, laŭ Homarano, „*ke ili parolas kaj revas pri la frateco de la homaro kaj ni celas ĝin praktike efektiviĝi*“. Ĉi tiu sendube hereza konkludo de judo certe ne povis esti akceptebla por kristana pastro. Longe Homarano ankaŭ provis klarigi al Dombrovskij la problemon de falsa patrioteco kaj la principon de sengenteco, ekzemple ĉe landnomoj, kiun li kiel 'homo de la sistemo' evidente ne povis percepti.

Fine, por kontraŭ-argumenti la riproĉon de la kontraŭ-religieco de la hilelismo, Homarano admonis, ke la homaranismo „*estas destinita sole nur por homoj libere pensantaj*“ kaj ke „*la homaranismo ilin rekondukis al Li*“. Necesas kompreni la simplan veron, ke Zamenhof kiel judo ne povis esti kredanto de kristanismo, nek adepto de iu eklezio. En lia repliko eĉ aperis akraj riproĉoj kontraŭ la eklezio, nome ke la eklezio forigis la homojn de la vera Dio. La „*diversajn elpensitajn 'sanktajn verojn'*“ de la eklezio Zamenhof-Homarano simple rifuzis – ili havus nenion komunan kun la vera religio. Pro tio la homoj preferus la „*nekonatan misteran Forton de la mondo*“, „*sed ili ne povas tion ĉi fari, ĉar la nomon de Dio*

*abomenigis al ili la falsa eklezia ideo pri Li*“. Por tiuj Di-kredantoj iri en preĝejon estus „hipokritaĵo“. Konklude: „*La homaranismo redonas al ili almenaŭ parte tion, kion ili perdis*“. Zamenhof – ĉu malamiko de la kristanismo kaj de la kristana eklezio?

Por ekskludi ĉian miskomprenon, Homarano emfazis, ke „*la homaranismo tute ne volas anstataŭigi la ekzistantajn religiojn (...) per aliaj*“, ĝi volus esti nur „paralela“ al ili. Per la homaranismo „*ni volas ne pereigi la religion, sed savi ĝin de la senduba pereco, al kiu alkondukis ĝin la batalado inter la prudento kaj eklezio*.“

Ĉi tiu konflikto eble montras pli klare, kial multaj esperantistoj ne volis okupiĝi konkrete pri la homaranismaj ideoj de Zamenhof, kiun ili konsideris kiel privataĵon de la kreinto de Esperanto. Tial la homaranismo estis forgesita kaj poste ne plu ludis rolon en la konscio de la esperantistoj. Ne nur la lingvistikaj, ortografiaj kaj gramatikaj demandoj en la lingvo Esperanto, sed ankaŭ la konkretaj ideologiaj (hilelismaj) konsideroj de Zamenhof distancigis kelkajn esperantistojn, ĉefe en Francio, sed ankaŭ en Svislando (kiel mi montros en Svisa Enciklopedio Planlingva), de Zamenhof kaj de ties lingvo Esperanto kaj kondukis ilin en la havenon de la Ido-movado. Nu la Ido-movado certe havas sian kernon jam antaŭe, sed la tempo de la eksplodo de la Ido-skismo ĝuste *post* la apero de la homaranismo eble ne estis hazardo. En tiu kunteksto necesus relegi ĉiujn gravajn dokumentojn lige kun la genezo de Ido. Kaj necesus ankaŭ studi la talmudon aŭ ricevi klarigojn de judreligia fakulo por pli bone kompreni la judecon de L.L. Zamenhof.

### **Ankaŭ francoj rifuzis la homaranismon**

Pri la sinteno en Francio, Zamenhof skribis al Emile Javal (09.04.1906) jenajn liniojn: „*Pri la ideo de homaranismo mi scias tre bone, ke nun ĝi en Francujo havos nenian sukceson kaj en la unua tempo ĝi trovos tie nur atakon kaj ridon*“, kaj aldonis: „*sed konante la grandan kaj noblan francan popolon, kiu la unua proklamis la rajtojn de ‘homo’, kiu plene ensorbis en sin la ideojn de la granda revolucio, - mi estas tute plene konvinkita, ke pli aŭ malpli frue (eble eĉ tre baldaŭ) la francoj pli ol ĉiuj aliaj forte entuziasmiĝos por la homaranismo kaj fariĝos la apostoloj de tiu ĉi ideo por la tuta mondo*“<sup>5</sup>. Kvankam Zamenhof konfirmis, ke temas pri lia „*profunda kredo*“, en tiu ĉi punkto li evidente eraris, estis tro naiva aŭ volis esti diplomata. La jaro en kiu li aperis kun sia homaranismo estis en Francio ne for de la antisemitaj ekscesoj (Dreyfus-skandalo) kaj de la formala separo inter eklezio kaj ŝtato en la jaro 1905. Cetere ŝajnas, ke Javal (kiu devenis de alsaca juda familio) pretis helpi al Zamenhof disvastigi lian homaranismon, ĉar laŭ letero de Zamenhof al tiu franco (23.04.1906) Javal promesis sciigi la homaranismon al la ĉefaj francaj gazetoj. Evidente Javal ne aprobis kelkajn punktojn en la homaranismo, sed ĉar li volis kuraĝigi kaj apogi Zamenhofon, li montris helpemon kaj ilia korespondado estis civilizita, milda kaj fruktodona.

En sia letero de la 8a de junio 1906 al Javal Zamenhof konfesis tri principajn erarojn en la homaranismo: 1. tro grava kaj tuja rolo al neŭtrala lingvo; 2. la nekutimaj nomoj por landoj; 3. religia dogmo. Tial li skribis, ke li decidis ŝanĝi tiujn detalojn, sed delegis la diskuton al la Unua Grupo Homarana (ĉar supozeble Zamenhof mem ne deziris ŝanĝi tiujn punktojn).<sup>6</sup>

### **Kritiko de de Beaufront**

Alia franco, kiu ne ŝatis la homaranismon, estis Louis de Beaufront (1855-1935), doktoro pri teologio, franca katoliko (kaj posta protagonisto de Ido). Li riproĉis al Zamenhof i.a., ke la homaranoj estus konstruintaj sian tutan aferon sur la sukceso de la bulonja kongreso.

La homaranoj replikis, ke la „*homaranismo estis preparata en la daŭro de tre multaj jaroj*“. Due de Beaufront imputis al Zamenhof kaj ties homaranoj, ke ili estus tro naivaj, ĉar ili kredus, ke la homaranismo donus al la homaro plenan pacon kaj feliĉon. Reage al tiu riproĉo Zamenhof atentigis, ke oni diris la samon antaŭ dudeko da jaroj kiam Esperanto estis publikigita. Trie de Beaufront ne povis vidi parencecon inter esperantismo kaj homaranismo. Zamenhof klarigis al li, ke „*Lingvo internacia havas la celon krei inter la gentoj neŭtralan ponton en rilato lingva, la homaranismo volas krei tian saman ponton en ĉiuj rilatoj.*“ La homaranismo estus do „*nur plifortigita esperantismo*“, krom tio la deklaro estus „*nur provizora, por prezenti la esencon de nia afero, kaj la teksto definitiva estos fiksita nur iam poste, post matura komuna interkonsiliĝo*“. En la sama letero Zamenhof konfesis, ke „*la homaranismo estas ja nia idealo privata, kiun ni al aliaj esperantistoj tute ne intencas altrudi*“. Necesas kompreni, ke Zamenhof neniam vidis en Esperanto nur rimedon nur por „*interŝanĝi ilustritajn poŝtajn kartojn aŭ por fari bonajn negocojn – aŭ eĉ por sukcese militi inter si*“, sed li vidis en ĝi ĉiam ankaŭ la grandan *internan ideon*, por kiu indus labori kaj lukti.

Se mi skribis ĉi tie, ke *Zamenhof* replikis, tiam efektive la koncernan nefermitan respondleteron al de Beaufront subskribis d-ro Aleksandro Naumann, sekretario de la Unua Grupo Homarana. Ĝi estis publikita en *Ruslanda Esperantisto*, n-ro 6-7/1906.

### **Kiu ankoraŭ kontraŭis la homaranismon?**

Inter aliaj francaj kritikantoj de la hilelismo-homaranismo troviĝis la esperantistoj Gaston Moch, Carlo Bourlet, Théophile Cart kaj Hippolyte Sebert. La argumentoj esprimiĝis parte el la racia-ateista perspektivo.

En sia letero de la 26a de majo 1906, al Javal, Zamenhof skribis: „*La plej akraj malamikoj de la homaranismo estas la esperantistoj Varsoviaj*“ kaj iom klarigis la kaŭzon. Ŝajnas, ke la poloj tute ne aprobis, ke Polujo estu nomata „*Varsovia Lando*“.<sup>7</sup>

La orienteŭropaj judoj, kiuj inter si kverelis pri la plej taŭga koncepto por la estonteco de la judaro (cionistoj, bundistoj, aŭtonomiistoj), estis mem okupataj pri la demando de la reaktivigo de la *juda (jida) lingvo* kaj evidente havis nulan komprenon por la ideoj de sia samgentano L.L. Zamenhof.<sup>8</sup>

Alia konata kritikanto de la homaranismo de Zamenhof fariĝis poste ankaŭ E.K. Drezen (1892-1937), kiu aliĝis al la Esperanto-movado en 1911. Tial persone li ne spertis la homaranisman diskuton. Li argumentis el la vidpunkto de komunisto-materiisto, kiu ne povis malkovri klasbatalan karakteron en la zamenhofa homaranismo, kies religiecan karakteron Drezen kompreneble ne povis akcepti.<sup>9</sup>

(Daŭrigote. En la venonta tria kaj lasta parto mi montros, kiel oni malrekomendis al Zamenhof prezenti aŭ nur menciis la homaranismon en la 2a Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, kiel li hezitis veturi al tiu kongreso, sed finfine tamen aperis. Ni aperigos ankaŭ la ĝenevan kongresparoladon de Zamenhof de la jaro 1906, do antaŭ ekzakte 100 jaroj.)

Piednotoj:

<sup>1</sup> ludovikito, klopodis organizi sed vane, p. 254-5.

<sup>2</sup> vd. SES informas 1/2006, p. 16.

<sup>3</sup> detale pri tio mi skribis en mia universitata diplomverko de 1992 (nepublikigita), kie oni ankaŭ trovas la originajn fontindikojn.

<sup>4</sup> klopodis organizi sed vane pp. 266, 273.

<sup>5</sup> klopodis organizi sed vane p. 298.

<sup>6</sup> klopodis organizi sed vane p. 340.

<sup>7</sup> klopodis organizi sed vane p. 329.

<sup>8</sup> WEINSTEIN, Miriam (2003): Jiddisch. Eine Sprache reist um die Welt, S. 98f.

<sup>9</sup> DREZEN, E: Zamenhof. Moskvo 1929, p. 11-14, 16s.; vd. ankaŭ: DREZEN, A.: Analiza historio de Esperanto-movado. Moskvo 1930, p. 34s.

### Parto III

En la sama jaro 1906 Zamenhof volis prezenti sian hilelismom-homaranismon al la partoprenantoj de la 2a universala kongreso de la e-istoj en Ĝenevo. Sed ho ve! – oni baris al li tiun intencon. Emile Javal, eminenta franca e-isto kaj ano de juda familio el Alsaco, kompreninte la tiklan situacion, kiun Zamenhof kaŭzis kun sia doktrino, konsilis al la humanisto el Varsovio eĉ ne veturi Ĝenevon por eviti publike paroli pri la homaranismo kaj tiel eviti eventualan skandalon. La aŭtoro de Esperanto ofendiĝis kaj efektive dubis ĉu li entute alvenu en la kongreso.

#### Korespondaĵoj kun Javal

Konserviĝis la kortuŝa korespondado inter Zamenhof kaj Javal de aŭgusto 1906, kiu bone montras la dubeman sintenon de Zamenhof. Mi ne povas prezenti ĉi tie tiun korespondadon en sia plena longeco, sed kelkajn ĉerpajojn oni povas citi, ekzemple el la letero de Zamenhof al Javal de la 3a de aŭgusto 1906:

“Mi danke ricevis Vian leteron de 29a VII. Laŭ Via konsilo mi elĵetos el mia kongresa parolo la lastan parton tuŝantan la homaranismon kaj mi parolos nur pri la interna ideo de la esperantismo, lasante al ĉiu klarigi al si la esencon de la ideo, kiel li volas. Pri mia veno Ĝenevon mi povas diri al Vi jenon: Post la ricevo de Via letero mi tuj decidis, ke mi *ne* iros Ĝenevon, ĉar tia estis ankaŭ mia propra deziro, sed mi nur timis, ke per tio mi faros malagrablaĵon al la esperantistoj kaj precipe al la organizantoj de la kongreso. Kiel homo *privata* mi partoprenus en ĉiu kongreso kun la plej granda ĝojo, sed kiel homo *oficiala* mi ĉiam tre ĝojis, ĉar mi diris al mi, ke nun mi povas resti hejme kun pura konscienco. Sed pripensinte bone la aferon, mi ektimis, ke mia neveno, eĉ sub la preteksto de grava malsano, farus malbonan impreson kaj tre malbonigus la humoron de la kongresanoj. Tial mi petas Vin, volu denove pripensi la aferon kaj skribi al mi Vian opinion, nome:

- a) ĉu mi devas tute ne veni Ĝenevon;
- b) ĉu mi devas tien veni, malfermi la kongreson kaj la sekvantan tagon tuj forveturi silente, sub la preteksto de malsaneco;
- c) ĉu mi devas resti en Ĝenevo ĝis la oficiala fermo de la kongreso?

Pli malpli la saman leteron li sendis al generalo Sebert, kiu konsilis rezigni pri la homaranismo kaj fari kelkajn ŝanĝojn en la parolado.

## Ĉu veni aŭ ne Ĝenevon ?

En alia letero al Javal, nome je la 15a de aŭgusto el Bad Reinerz, Germanio, Zamenhof konfirmis sian ŝanceliĝadon ĉu veni al Ĝenevo aŭ ne. Devis esti emocia kaj iom turmenta periodo por Zamenhof, kiu ne povis scii, kio okazos en Ĝenevo.

Li skribis do al Javal:

“Mi skribis jam al Vi, ke mi persone tre nevolonte veturas Ĝenevon. Se la komitato de organizado trovus, ke la bono de Esperanto postulas, ke mi ne venu Ĝenevon, mi akceptus tion ĉi kun tre granda plezuro. (...) Pripensinte la aferon pli multe, mi venis al la konkludo, ke mia forestado farus en la kongreso tre malbonan impreson. Oni suspektos ian kaŝitan kaŭzon, eble malpacon inter mi kaj la organizantoj; oni suspektos, ke mi ne havas sufiĉe da kuraĝo por defendi publike miajn ideojn, ke mi forkuras de la kampo de batalado. (...)

Ĉu rezigni pri homaranismo?

Vi povas tamen esti trankvila. Mi faros en Ĝenevo nenion sen antaŭa konsiliĝo kun Vi kaj kun la komitato de organizado. Mia *persona* opinio koncerne la duan parton de mia parolo estas simila al la Via, t.e. mi opinias, ke mi *ne* devus ĝin forigi, sed montri min tute malkaŝe tia, kia mi estas, por meti finon al ĉiuj malĝustaj famoj. Ŝajnas al mi, ke tia malkaŝa eliro alportus al Esperanto pli da bono ol da malbono, tiom pli ke mi anoncus tute klare, ke la homaranismo prezentas mian dogmaron pure *personan*, ke mi ĝin al neniu altrudas, ke mi eĉ tute ne havis la intencon paroli pri ĝi publike, sed mi decidis tion ĉi nur en la lasta minuto, por meti finon al diversaj malĝustaj famoj. (...) Se la komitato de organizado restos ĉe tia opinio, ke la legado de la dua parto de mia parolo povas esti malutila, tiam mi senproteste ĝin forigos. En tia okazo mi en Ĝenevo tute silentos pri la homaranismo. (...) Tiamaniere devas malaperi Via timo, ke mia veno Ĝenevon povas fariĝi danĝera.

## Zamenhof timas skandalon

Sekvis ankoraŭ unu korespondaĵo inter Javal kaj Zamenhof, kiu devis tute konfuzi la aŭtoron de la homaranismo, kaj Zamenhof la 20an de aŭgusto ne plu sciis kion fari. Li respondis al Javal:

“Hieraŭ vespere mi ricevis Vian telegramon, kiu min tute konfuzis. Nun mi absolute ne scias, kiel agi. De unu flanko mi komprenas tre bone, ke, se Vi tiel obstine restas ĉe Via opinio kaj ĉiam konsilas al mi ne veturi, Vi sendube havas por tio ĉi iajn gravajn kaŭzojn. (...) Mi supozas ankaŭ, ke en la mondo esperantista ekzistas kelkaj fluoj aŭ intencoj, kiujn mi, kiel tute izolita, ne scias, sed kiujn Vi, komunikiga kun multaj personoj, bone vidas. Tial mi tre volonte dezirus plenumi Vian konsilon kaj resti hejme. Sed de la dua flanko mi, tute ne komprenante ĝis nun la kaŭzojn, kiuj kreis Vian opinion, vidas nur tro klare la grandan skandalon, kiun povus kaŭzi mia neveno Ĝenevon, tiom pli ke en la daŭro de tuta jaro oni bedaŭrinde anoncadis, ke la kongreso estos sub mia prezidado. Oni diros kredeble, ke mi ne venis pro la homaranismo, ke mi min kaŝas, ke mi ne sole ne havas la kuraĝon defendi miajn ideojn publike, sed mi post la publikigo de la homaranismo ne kuraĝas eĉ montri min al la mondo.” (...) La situacio sekve estas nun jena: la utilon, kiu venus de mia neveturado, mi ĝis nun ankoraŭ ne bone komprenas; dume la grandan *malutilon* kaj diversajn malagrablojn, kiuj donus mia neveturado, mi vidas tro bone; tial mi dume, ĝis ricevo de pli detala klarigo de Vi, decidis prepariĝi al la vojaĝo. Sed en la okazo, se Via opinio ĝis nun ne ŝanĝiĝis (...) tiam mi blinde plenumos Vian konsilon kaj mi restos hejme”.

Do estis evidente la lasta letero de Zamenhof al Javal. Supozeble li forveturis la 23an de aŭgusto, kaj la 28an de aŭgusto li realigis sian parolon antaŭ la dua kongreso en Ĝenevo.

La elstara parolado de Zamenhof trovis varman akcepton en Ĝenevo, kaj ĝi restis enhave, stile kaj retorike unu el la plej trafaj, brilaj kaj impresaj tekstoj iam ajn verkitaj en Esperanto pri tiu ĉi temo.

Kvankam la hilelismo-homaranismo mem poste estis grandparte forgesita de la e-istoj, multaj inter ili estas konvinkitaj, ke sen tiu ideologia bazo la interna ideo de Esperanto ne ekzistus. Ĝuste la interna ideo respondecas apud la genia gramatika konstruado de la lingvo Esperanto, ke tiuj lingvo kaj movado pluvivis. Do ekzakte en tiuj du punktoj Esperanto distingiĝas de aliaj planlingvoj, kiuj post Esperanto estis proponitaj kaj kiuj fakte estas pli lingvistike ol sociideologie orientitaj.

### **Kongresparolado de L.L. Zamenhof okaze de la Dua Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, la 28an de aŭgusto 1906.**

(laŭ ludovikito, klopodis organizi, sed vane!, p. 361-369; subtitoloj aldonitaj de aK)

#### **Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj!**

Mi esperas, ke mi plenumos la deziron de ĉiuj alestantoj, se en la momento de la malfermo de nia kongreso mi esprimos en la nomo de vi ĉiuj mian koran dankon al la brava svisa lando por la gastameco, kiun ĝi montris al nia Kongreso, kaj al lia Moŝto la Prezidanto de la Svisa Konfederacio, kiu afable akceptis antaŭ du monatoj nian delegitaron. Apartan saluton al la urbo Ĝenevo, kiu jam multajn fojojn glorie enskribis sian nomon en la historion de diversaj gravaj internaciaj [kaj homunuigaj<sup>1</sup>] aferoj.

Permesu al mi ankaŭ, esprimi en la nomo de vi ĉiuj nian koran dankon al la organizintoj de la nuna Kongreso. [Zamenhof dankas al la svisaj esperantistoj, al la Provizora Centra Organiza Komitato, ktp.]

#### **Sinjorinoj kaj sinjoroj!**

Ĉe la malfermo de nia Kongreso vi atendas de mi ian parolon; eble vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferentan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. *Tian* parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe *nun*, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas por libereco, por la plej elementa homa libereco, por la *rajtoj de homo*. Pri tio ĉi mi tamen ne parolus al vi; ĉar se kiel *privata homo* ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multmiliono lando, tamen kiel *esperantistojn* tiu ĉi batalado ne povus vin tuŝi, kaj nia Kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun faranta io, kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la *gentoj*. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando – tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj

de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage per batalado *intergenta*. Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo!

### **Bjelostok kaj la batalado inter la gentoj**

Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bjelostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis iam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj songoj mi ekvidis teruran efektivaĵon; en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kranojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bjelostoka buĉado; al vi kiel al esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bjelostok kaj multaj aliaj urboj; ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpaj en la konstanta buĉado, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon, kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaj kaj plej malnoblaj rimedoj<sup>2</sup>, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciprokas bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de nia gento<sup>3</sup>, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili la eblon libere konatiĝi kaj komunikiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj; ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de *tiu* bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka<sup>4</sup> sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado.

### **La interna ideo**

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la *internan ideon* de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.

El la Deklaracio unanime akceptita en la Bulonja Kongreso ni ĉiuj scias, kio estas la esperantismo en rilato *praktika*; el tiu ĉi Deklaracio ni ankaŭ scias, ke „esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”. Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu revas unuigi per Esperanto la homaron,



esperantisto estas ankaŭ tiu persono, kiu uzas Esperanton ekskluzive por celoj praktikaj, esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon; esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi; esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj hommalamaj. Sed krom la flanko *praktika*, deviga por ĉiuj kaj montrita en la Deklaracio, la esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon *idean*. Tiun ĉi flankon diversaj esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj. Tial por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis lasi al ĉiu plenan liberecon, akcepti la internan ideon de la esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ – se li volas – eĉ tute ne akcepti por la esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj esperantistoj, la Bulonja Deklaracio precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn: „Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia esperantisto<sup>5</sup> ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure *privata*, por kiu la esperantismo ne respondas.” Sed bedaŭrinde la vorton „privata” kelkaj amikoj-esperantistoj klarigis al si en la senco de „malpermesata”, kaj tiamaniere anstataŭ konservi por la interna ideo de la esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

### **Nur la praktika utileco de Esperanto ne interesu nin!**

Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniuj donas la rajton postuli, ke ni *ĉiuj* vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras: „Esperanto estas *nur* lingvo; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun la *ideo*, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon!” Ho kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas *ĉiuj* elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!”

### **Frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj**

Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinte posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj, sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava *ideo*, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo – vi ĉiuj sentas ĝin tre bone – estas Tiu ĉi ideo akompanadis Esperantismon de la unua momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Ĝi instigis la aŭtoron de Esperanto, kiam li estis ankoraŭ malgranda infano; kiam antaŭ dudek ok jaroj rondeto da junaj diversgentaj gimnazianoj festis la unuan signon de vivo de la estonta Esperanto, ili kantis kanton, en kiu post ĉiu strofo estis ripetataj la vortoj: „malamikeco de la nacioj, falu, falu, jam estas tempo”. Nia himno kantas pri la „nova sento, kiu venis en la mondon”, ĉiuj verkoj, vortoj kaj agoj de la iniciatoro kaj de la unuaj esperantistoj ĉiam spiras tute klare tiun saman ideon. Neniam ni kaŝis nian ideon, neniam povis esti eĉ la plej malgranda dubo pri ĝi, ĉar ĉiu parolis

pri ĝi. Kial do aliĝis al ni kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“?<sup>6</sup> Kial ili ne timis, ke la mondo kulpigos ilin pri granda krimo, nome pri la deziro, helpi al iom-post-ioma-unuiĝo de la homaro? Ĉu ili ne vidas, ke iliaj paroloj estas kontraŭaj al iliaj propraj sentoj kaj ke ili senkonscie revas pri tio sama, pri kio *ni* revas, kvankam pro neĝusta timo antaŭ sensencaj atakantoj ili penas tion ĉi nei?

Se mi la tutan pli bonan parton de mia vivo memvole pasigis en grandaj suferoj kaj oferoj kaj ne rezervis por mi eĉ ian rajton de aŭtoreco – ĉu mi faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se la unuaj esperantistoj pacience elmetadis sin ne sole al konstanta mokado, sed eĉ al grandaj oferoj, kaj ekzemple unu malriĉa instruistino longan tempon suferis malsaton, nur por ke ŝi povu ŝpari iom da mono por la propagando de Esperanto – ĉu ili ĉiuj faris tion ĉi pro ia praktika utileco? Se ofte personoj alforĝitaj al la lito de morto skribadis al mi, ke Esperanto estas la sola konsolo de ilia finiĝanta vivo, ĉu ili pensis tiam pri la praktika utileco? Ho, ne, ne, ne! Ĉiuj memoris nur pri la interna *ideo* entenata en la esperantismo; ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la *korpojn* de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la *cerbojn* de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn *korojn*.

### La entuziasmo de Bulonjo

Vi memoras, kiel forte ni ĉiuj estis entuziasmitaj en Bulonjo sur Maro. Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la tiea kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablan kaj plej entuziasman memoron por la tuta vivo, ĉiuj ĝin nomas „la neforgesebla kongreso“. Kio do tiel entuziasmigas la membrojn de la kongreso? Ĉu la amuzoj per si mem? Ne, ĉiuj ja povas havi sur ĉiu paŝo multe pli grandajn amuzojn, aŭskulti teatraĵojn kaj kantojn multe pli bonajn kaj plenumatajn ne de nespertaj diletantoj, sed de plej perfektaj specialistoj! Ĉu nin entuziasmigas la granda talento de la parolantoj? Ne; ni tiajn ne havis en Bulonjo. Ĉu la fakto, ke ni komprenis nin reciproke? Sed en ĉiu kongreso de samnacionoj ni ja komprenas nin ne malpli bone, kaj tamen nenio nin entuziasmigas. Ne, vi ĉiuj sentis tre bone, ke nin entuziasmigas ne la amuzoj per si mem, ne la reciproka sinkomprenado per si mem, ne la praktika utileco, kiun Esperanto montris, sed la interna *ideo* de la esperantismo, kiun ni ĉiuj sentis en nia koro. Ni sentis, ke komenciĝas la falado de la muroj inter la popoloj, ni sentis la spiriton de ĉiuhoma frateco. Ni konsciis tre bone, ke, ĝis la fina malapero de la muroj, estas ankoraŭ tre kaj tre malproksime; sed ni sentis, ke ni estas atestantoj de la unua ekbato kontraŭ tiuj muroj; ni sentis, ke antaŭ niaj okuloj flugas la fantomo de pli bona estonteco, fantomo ankoraŭ tro nebula, kiu tamen de nun ĉiam pli kaj pli korpiĝados kaj potenciĝados.

Jes, miaj karaj kunlaborantoj! Por la indiferenta mondo Esperanto povas esti nur afero de praktika utileco. Ĉiu, kiu uzas Esperanton aŭ laboras por ĝi, estas Esperantisto, kaj ĉiu Esperantisto havas plenan rajton vidi en Esperanto nur lingvon, simplan, malvarman internacian kompreniĝilon, similan al la mara signaro, kvankam pli perfektan. *Tiaj* Esperantistoj kredeble ne venos al niaj kongresoj aŭ venos al ili nur por celoj esploraj aŭ praktikaj aŭ por malvarma diskutado pri demandoj pure lingvaj, pure akademias, kaj ili ne partoprenos en nia ĝojo kaj entuziasmo, kiu eble ŝajnos al ili naiva kaj infana. Sed tiuj esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne per sia kapo, sed per sia *koro*, tiuj ĉiam sentos kaj ŝatos en Esperanto antaŭ ĉio ĝian internan *ideon*; ili ne timos, ke la mondo moke nomos ilin utopiistoj, kaj la naciaj ŝovinistoj eĉ atakos ilian idealon kvazaŭ krimon; ili estos fieraj pri tiu nomo de utopiistoj. Ĉiu nia nova kongreso fortikiĝos en ili la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom niaj ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de la homa frateco.

## Kion LLZ ne povis diri en Ĝenevo

La de kelkaj kolegoj proponitan koncepton de Esperanto, ke ĝi servu nur al praktikaj celoj sen konsideri la flankon idean, Zamenhof klare rifuzis. Tial okazis, ke la dua parto de la parolado pri homaranismo, kiun Zamenhof volis, sed ne povis laŭtlegi en Ĝenevo, estis publikigita nur en 1959 en *La Nica Literatura Revuo*, n-ro 6. Fakte tiu parto konsistis, krom enkondukaj klarigoj, grandparte el la 'Deklaracio de homarano' mem. Jen la enkondukaj vortoj de Zamenhof al tiu ĉi dua parto:

Mi diris, ke, krom la oficiala esenco de la esperantismo, kiu estas esprimita en la Bulonja Deklaracio, la esperantismo enhavas ankoraŭ *ideon internan*, kiu ne estas deviga por ĉiuj, sed kiun memvole kulturas en si ĉiuj esperantistoj-idealistoj. Tiun ĉi ideon ĉiu povas klarigi kaj formuli al si tiel, kiel diktas al li lia propra kapo kaj koro. Permesu al mi, ke mi raportu al vi, kiamaniere *mi* komprenas tiun ideon. Sed por eviti ĉiun malkompreniĝon, mi devas antaŭ ĉio atentigi vin, ke tio, pri kio mi nun parolos, prezentas miajn principojn pure *personajn* kaj *privatajn*. Mi ne sole ne proponas al vi ilian akcepton, sed mi eĉ ne demandos vian opinion pri ili. Mi simple nur raportos.

Mi parolos al vi pri tio, pri kio multaj el vi jam ion aŭdis - nome pri la "Homaranismo". Ne ektimu, sinjoroj! Mi scias, ke oni prezentis al vi la aferon kiel ion teruran, kiel grandan danĝeron por Esperanto. Estu paciencaj, aŭskultu kaj juĝu.

Mi neniam havis la intencon paroli en kongreso esperantista pri miaj privataj principoj kaj kredoj, kiuj estas formulitaj en la homaranismo. Antaŭ dek monatoj mi supozis, ke en la Ĝeneva kongreso mi eble en unu el la kunvenoj pure *privataj* priparolos miajn principojn; sed baldaŭ mi eĉ tiun ĉi mian intencon tute forĵetis. Dezirante, ke la mondo vidu en mi nur la aŭtoron de Esperanto, mi decidis kaŝi por ĉiam mian nomon kiel iniciatoron de la homaranismo, mi transdonis mian principaron al kelkaj amikoj kaj mi petis ilin, ke ili laboru.

Sed la cirkonstancoj aranĝiĝis tiamaniere, ke mi estas nun devigata ne sole forigi mian kaŝitecon, sed eĉ fari tion ĉi tute *publike*. En la komenco de tiu ĉi jaro, en la nomo de grupo da personoj, kiuj akceptis por si la nomon "Unua Grupo Homarana", aperis la unua broŝuro pri la homaranismo, kiu devis esti nur prova balono, por aŭskulti diversajn opiniojn. Sed malgraŭ ke en la broŝuro estis klare dirite, ke ĝia teksto estas nur provizora kaj poste perfektigota, kaj malgraŭ ke la broŝuro volis prezenti nur principaron tute *privatan*, al neniu altrudatan, kelkaj esperantistoj, anstataŭ trankvile kritiki la aferon, komencis akran atakadon kontraŭ ĝi. Tiuj ĉi atakoj devigis min forigi mian kaŝitecon, ĉar plua kaŝiteco povus pensigi, ke mi kaŝas min kontraŭ la batoj, aŭ ke mi hontas kaj timas konfesi publike miajn principojn; kaj ĉar oni baldaŭ komencis rakontadi, ke la iniciatoro de la homaranismo estas la aŭtoro de Esperanto kaj ke mi havas iajn kontraŭnaturajn principojn, kiuj baldaŭ pereigos la tutan aferon Esperantan, tial - por meti finon al „ĉiuj suspektoj kaj malĝustaj famoj - mi en la lasta monato antaŭ la kongreso decidis proklami miajn principojn tute *publike* en mia kongresa parolo.

Tiujn ĉi principojn mi nun prezentos al vi en formo de Deklaracio, kiun mi kaj miaj samprincipanoj akceptis por ni. Sed mi ripetas, ke la Deklaracio, kiun mi legos al vi, prezentas principojn pure *privatajn* de mi kaj de la Unua Grupo Homarana; por la mondo esperantista ili havas nenion devigan.

La Homaranismo estas celado al pura homeco kaj al absoluta intergenta justeco kaj egaleco. En ĉiu lando tiu gento, kiu prezentas la plimulton kaj kutimis regi super la aliaj gentoj, longe ne komprenos la homaranismon; sed neniu gento povas scii, kio estos kun ĝi morgaŭ, kaj, pli aŭ malpli frue, ĉiuj honestaj homoj konvinkiĝos, ke regado per fortoj konvenas al bestoj, sed ne al homoj, kaj ke paca vivado sur la tero kaj ĉeso de militoj estas ebla ne per malfortikaj kaj maljustaj kompromisoj, sed nur per justeco absoluta, egala por ĉiuj gentoj, lokoj kaj tempoj. Tian justecon penas esprimi la Deklaracio de la Homaranoj.

Ĉar pro tiu aŭ alia nelerta aŭ nepreciza esprimo en la Deklaracio la malamikoj de la homaranismo atakas la tutan esencon de la afero, tial mi ripetas la vortojn, kiuj per grandaj kaj grasaj literoj estis presitaj en la unua broŝuro pri la homaranismo, nome: la nuna teksto de la Deklaracio estas nur provizora; la definitiva teksto estos fiksita nur iam poste, post sufiĉe matura interkonsiliĝo inter ĉiuj grupoj homaranaj.

La versio antaŭvidita por laŭtlegado en Ĝenevo laŭ la ideoj esence identas kun la teksto de la Deklaracio de Homarano (Homaranismo) de marto 1906, post kiam Zamenhof forstrekis la nocion hilelismo. Tamen la ĝeneva versio estis draste prilaborita kaj modifita, tiel ke la teksto havas alian formon.

Komence de 1913, Zamenhof sendis al generalo Sebert sian planon por organizi kongreson pri „neŭtrala religio“. Ĉe la pariza eldonejo Hachette Zamenhof klopodis eldoni la prilaboritan formon de la homaranismo. Ĉar ĝi malakceptis la aŭtoro de Esperanto publikigis la dogmaron en madrida gazeto sub la titolo

„Deklaracio pri Homaranismo“. Kiel komenton Zamenhof skribis: „Ne por la celo de propagando mi publikigas nun mian kredon; mi simple deziras, ke miaj amikoj konu mian kredon, por ke ilin ne mirigu mia rilato al tiu aŭ alia politika aŭ religia demando kaj por ke la personoj, kiuj havas la samajn principojn kiel mi, sciu ke ni estas samprincipanoj“. (majo 1913)

### **Notoj:**

<sup>1</sup> „kaj homunuigaj“ mankas en O.V., sed ekzistas ĉe ludovikito.

<sup>2</sup> „kaj plej ruzaĵ“ mankas en O.V., sed ekzistas ĉe ludovikito

<sup>3</sup> en O.V. estas „aliaj gentoj“

<sup>4</sup> „reciproka“ mankas en O.V.

<sup>5</sup> en O.V. estas „persono“ anstataŭ „esperantisto“

<sup>6</sup> en O.V. estas jena versio: ... ĉar ĉiu parolis pri ĝi kaj sindone kaj senprofite laboris kun ni. Kial do aliĝis al ni la personoj, kiuj vidas en Esperanto „nur lingvon“?

### **Bibliografio:**

- ludovikito, klopodis organizi, sed vane!, p. 371-377.

- Mi estas homo. Originalaj verkoj de d-ro L.-L. Zamenhof. Serio Scio, Volumo 6, Sezonoj, Kaliningrado 2006.

- Van Kleef, C.: La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof. Historia enketo pri la naskiĝo kaj evoluo de la Zamenhofs Homaranismo. Agen 1965.

- Dr. L.L. Zamenhofs Esperanto-Reden gehalten bei Eröffnung der Esperanto-Kongresse 1905-1912. Mit Einleitung über Programm und Ursprung des Esperantismus, begleitender deutscher Übersetzung und Anmerkungen. Herausgegeben von Dr. Emil Pfeffer. Wien (Jahrgabe fehlt).

### ***Baza literaturo pri tema (en Esperanto)***

- 1901: Gomo Sum: Projekt reŝenija evreiskago voprosa. (broŝuro).
- 1906: (anonima): Dogmoj de Hilelismo. En: Ruslanda Esperantisto (Sankt-Peterburgo), n-roj 1-3.
- 1912 kaj 1927: Privat, E.: Historio de la lingvo Eo.
- 1913 (majo): (Zamenhof, L.L.): Deklaracio pri Homaranismo. Varsovio/Madrado.
- 1923: Privat E.: Vivo de Zamenhof,
- 1929: Dietterle, J. (Red.): Originala Verkaro de L.L. Zamenhof, Leipzig. (vd. precipe p. 312-345.
- 1953: Waringhien, G.: La ideologia dramo de L.L. Zamenhof. En: Sennacieca Revuo. Paris.
- 1965: Van Kleef, C.: La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof. Historia enketo pri la naskiĝo kaj evoluo de la Zamenhofa Homaranismo. Agen.
- 1969: Holzhaus, A.: Doktoro kaj Lingvo Esperanto, Helsinki.
- 1972: Holzhaus, A. (Trad.): L.L. Zamenhof. Hilelismo. Projekto pri solvo de la hebrea demando. Helsinki.
- 1978: Maimon, N.Z.: La kaŝita vivo de Zamenhof. Tokyo.
- 1987-: Ludovikito (t.e. Kanti, I., red.): iam kompletigota plena verkato de L.L. Zamenhof.
- 1991: Künzli, Andy E.: D-ro L.L. Zamenhof estis „Ruslanda hebrea“. En: Franca Esperantisto. Revue française d'espéranto, novembro 1991, p. 318-319. Paris.
- 2000: Gorecka, H., Korjenkov, A.: Esperanto en Ruslando. Historia skizo. Jekaterinburg. Serio Scio, vol. 4.
- 2005: Cherpillod, A.: Hillel la Saĝulo. Courgenard.
- 2005: Korjenkov, A.: Historio de Esperanto. Kaliningrad. (vd. precipe p. 5-14). Serio Scio, vol. 5.

### ***Germanlingvaj verkoj:***

- 1925-29: Dubnov, S.: Weltgeschichte des jüdischen Volkes (von den Uranfängen bis zur Gegenwart). In 10 Bänden. Berlin.
- 1990: Haumann, H.: Geschichte der Ostjuden.
- 1990: Battenberg, F.: Das europäische Zeitalter der Juden. 2 Bde. Darmstadt.
- 1991: Künzli, A.: Interlinguistik und Esperanto im Zarenreich und in der Sowjetunion (Geschichte, Organisation, Ideologie, linguistische und literarische Aspekte). Lizentiatsarbeit der Philosophischen Fakultät I der Universität Zürich. Zürich/Kriens/Luzern 1991 (nepublikigita).
- 2002: Brenner, M.: Geschichte des Zionismus. München.
- 2003: Lex, M.: Kleine Geschichte des Antisemitismus. München.

### ***Fontoj kaj tekstoj troveblaj en interreto:***

Pri la historio de hilelismo de N.Z. Maimon:

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr54/historio.html> (unua parto)

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr55/hilelismo.html> (dua parto)

#### *Teksto de la hilelismo el la jaro 1901*

[http://homarano.narod.ru/Windows/hilel\\_e.htm](http://homarano.narod.ru/Windows/hilel_e.htm) (en Esperanto)

<http://www.esperanto.mv.ru/Hilelismo/index.html> (originalo en la rusa lingvo)

#### *teksto Dogmoj de Hilelismo (1906) aperintaj en Ruslanda Esperantisto*

<http://mylab.ike.tottori-u.ac.jp/~mijosxi/eo-/homar/HILEL1.TKS>

#### *La cionista periodo en la vivo de Zamenhof de N. Z. Maimon*

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr34/cionista.html> (unua parto)

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr35/cionista.html> (dua parto)

#### *Hilelismo de Josef MEISL elgermanigis N. Z. Maimon*

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr54/hilelismo.html>

Intervjuo kun d-ro Zamenhof (fino) de R. I. Harris, elangligis N. Z. Maimon

<http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/nlr/nlr64/zamenhof.html>

Deklaracio pri Esperantismo: <http://esperantio.narod.ru/lingve/dok/bulon.htm>